

Espero Katolika



Numero 1-3/2011

Januaro-Marto 2011



Sur la kovrilo: Ekspozicia spaco en la vatikanaj Muzeoj pri Radio Vatikana, honore al la 80-jariĝo de la "Radio de la Papo" (v. p. 6).

ENHAVO

“RELIGIA LIBERECO, VOJO AL LA PACO”	
Mesaĝo de la Papo por la monda tago de la paco 2011	3
“DIO FARIĜIS INFANO KIEL VI”	
Benedikto la 16a vizite al la etaj malsanuloj de polikliniko Gemelli	4
JOHANO PAŬLO LA 2a BEATA	
La miraklo, kiun oni atribuis al lia propeto	5
LA 80-JARIĜO DE RADIO VATIKANA	
Historio de la “Radio de la Papo”	6
Ekspozicia spaco de RV en la vatikanaj Muzeoj	8
LA 64a IKUE-KONGRESO 2011 EN ZAGREBO	
Unua bulteno kaj aliĝilo	9
LA KOPTOJ HIERAŬ KAJ HODIAŬ	
La jarmila historio de egipta popolo	14
MOVADĖ	18
FUNEBRE	19
Radio Vatikana, 19 - Landaj Reprezentantoj, 20	

Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio

Telefono kaj fakso: +39-06.39.63.81.29 - Elektronika poŝto: <ikue@ikue.org>
TTT-paĝoj: <http://www.ikue.org> - <http://www.esperokatolika.org> * Dissendolisto: <ikue@yahoo.com>
UEA-konto “ikue-v” * Banko: “Unione internazionale cattolica esperantista” Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

Presejo - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

Respondeca Direktoro - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

Espero Katolika, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de I.K.U.E.
INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA internacia asocio de fideluloj
fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de
la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Prezidanto:** Miloslav Švábek - **Vic-Prezidanto:** Sac. Attila
Szép - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Ĝenerala Sekretario:** Carlo Sarandrea - **Kasisto,**
direktoro de la C.O.: Antonio De Salvo - **Estraranoj:** Sac. Gabriel Anda, Sac. Lajos Kóbor,
Bruno Masala, Stanisław Śmigielski - **Kontorevizoroj:** Giovanni Daminelli, Pavol Petrik.



*Mesaĝo de Benedikto la 16a
por la monda tago de la paco 2011*

“RELIGIA LIBERECO, VOJO AL LA PACO”

La mesaĝo de la Papo por la 44a pacotago, dediĉita al la temo de la religia libereco, komenciĝas per mencio de unu el la kazoj de maltoleremo kontraŭ religioj: la atako de la 31a de oktobro 2010 kontraŭ la siro-katolika Katedralo “Nia Sinjorino de la Ĉiamdaŭra Helpo” en Bagdado, kie mortis du pastroj kaj kvindek de fideluloj: la Papo konstatas kiel en multaj landoj ne eblas libere manifesti sian fidon, dum en aliaj ĉeestas pli silentaj kaj rafinitaj formoj de antaŭjuĝo kaj oponado kontraŭ la fideluloj kaj la religiaj simboloj.

Lia mesaĝo poste aliras al jenaj temoj kies titolojn ni aldonas kun kelkaj ne elĉerpaj komentarioj alineoj, instigante al legado de la plena papa mesaĝo.

Sankta rajto al la vivo kaj al la spirita vivo: sen spirita vivo, la homo enmemiĝas kaj ne plu kapablas sperti aŭtentikan liberecon kaj estigi justan socion.

Religia libereco kaj reciproka respekto: tiu libereco kiu estu malamika aŭ indiferenta rilate al Dio, je la fino forneas sin mem kaj ne plu garantias plenan respekton de la aliulo.

La familio, lernejo pri libereco kaj paco: ĝi estas la unua ĉelo de la homa socio, kie formiĝas la harmoniaj rilatoj je ĉiuj niveloj de la homa kunvivado, nacie kaj internacie.

Komuna havaĵo: la religia libereco ne estas ekskluziva havaĵo de la kredantoj, sed de la tuta homa familio, kaj oni ne

povas ĝin malagnoski sen damaĝi ĉiujn rajtojn kaj la fundamentajn liberecojn.

Publika dimensio de la religio: estas nenegebla la kontribuo, kiun la religiaj komunumoj alportas al la socio pere de la karitataj kaj kulturaj institucioj, kaj ankaŭ la etika kontribuo de la religio en politika kadro.

Religia libereco, forto de libereco, danĝeroj de ĝia misuzo: foje oni pretekste sin turnas al la religia libereco por maski kaŝitajn profitojn. Oni ne povas ekspluati la religion, nek ĝin altrudi perforte.

Problemo de justeco kaj civilizacio - la fundamentalismo kaj la malamikeco kontraŭ la kredantoj kompromitas la pozitivan laikecon de la Ŝtatoj: la religia fundamentalismo kaj la laikismo estas ekstremaj formoj de rifuzo de la justa plurismo kaj de la principo de laikeco.

Dialogo inter civilaj kaj religiaj institucioj: la riĉaĵo de principoj kaj valoroj de la vera religio estas riĉaĵo por la popoloj kaj ties medioj.

Vivi en la amo kaj vero: en la mondo



globalizita, la grandaj religioj povas konsistigi gravan elementon de unueco kaj paco por la homa familio.

Dialogo kiel komuna celo: laŭ la Eklezio, la dialogo inter la anoj de malsamaj religioj konsistigas gravan ilon por kunlabori al la komuna bono.

Morala vero en politiko kaj diplomatio: ili devus priatenti la moralan kaj spiritan havaĵon proponatajn de la grandaj mondaj religioj por ekkoni la universalajn verojn, principojn, valorojn.

Preter la malamo kaj la antaŭjuĝo: oni ĉesigu la persekutojn, diskriminaciojn, perfortaĵojn, maltoleremon kontraŭ anoj de la religiaj minoritatoj, al kiuj estas

malpermesite eĉ konfesi sian kredon aŭ ŝanĝi sian religion.

Religia libereco en la mondo: en Azio, en Afriko, en la Meza Oriento kaj precipe en la Sankta Lando, la kristanoj ne malkuraĝiĝu, konsciante, ke la Evangelio estas kaj estos ĉiam signo de kontraŭdiro.

Religia libereco, vojo al la paco, ĉar la paco estas dia donaco kaj samtempe realigenda plano, neniam tute plenumita; ĝi estas la rezulto de procezo de puriĝo kaj de kultura, morala kaj spirita leviĝo, en kiu la homa digno estas plene respektata.

(el Katolika Sento)



La 6an de januaro momentoj de kortuŝiĝo kaj de aŭtentika amemo markis la viziton de Benedikto la 16a al polikliniko Gemelli en Romo. En la etoso de Epifanio, li renkontis la sanitarulojn kaj la enhospitaligitajn infanojn, li benis la centron por kuracado de bifida spino kaj poste li liveris kristnaskajn dolĉaĵojn kaj donacojn al la infanoj. Sekvis la vizito al la fako de intensa terapio por asistado de ĵusnaskitoj. Antaŭ ol reveni al Vatikano la Papo adresis al ĉiuj jenan simplan kaj elkoran paroladon.

“DIO FARIĜIS INFANO KIEL VI”

Kial mi venis ĉi tien, meze de vi, hodiaŭ, tago en kiu ni komencas celebri Epifanion? Antaŭ ĉio por diri dankon. Dankon al vi infanoj, kiuj akceptis min: mi deziras diri al vi, ke mi amas vin kaj ke mi estas proksima al vi per mia preĝado kaj amemo, ankaŭ por doni al vi forton dum alfronto de la malsano. Mi deziras poste danki viajn gepatrojn, viajn parencojn, la estrojn kaj la tutan personaron de la polikliniko, kiuj per kompetenteco kaj karitato priflegas la homan suferon; aparte mi deziras danki la grupon de ĉi tiu fako de pediatrio kaj de la centro por kuracado de infanoj kun bifida spino. Mi benas la personojn, la sindevigon kaj ĉi tiujn mediojn en kiuj oni realigas laŭ konkreta maniero la

amon al plej etaj kaj plej bezonantaj.

Karaj infanoj kaj geknaboj, mi deziris veni viziti vin ankaŭ por iomete fari kiel la Saĝuloj, kiel vi faris: la Saĝuloj alportis al Jesuo donacojn – oron, olibanon kaj mirhon – por elmontri al Li adoron kaj amemon. Hodiaŭ al vi ankaŭ mi portis kelkajn donacojn, ĝuste por ke vi sentu, pere de eta signo, la simpation, la proksimecon, la amemon de la Papo. Sed mi deziras, ke ĉiuj, plenkreskuloj kaj infanoj, dum ĉi tiu kristnaska tempo, memoru ke la plej grandan donacon faris Dio al ĉiu el ni.

Ni rigardu en la groto de Betlehemo, en la kripo, kiun ni vidas? Kiun ni renkontas? Estas Maria, estas Jozefo, sed

JOHANO PAŬLO LA 2a BEATA

“La rito por beatproklamo de la honorinda Diservanto Johano Paŭlo la 2 (Karol Wojtyła) okazos en Vatikano la unuan de majo 2011, dua paska dimanĉo, de la Dia Mizerikordo, ĉefcelebrata de Papo Benedikto la 16a”: per ĉi tiuj simplaj vortoj la vatikana proparolanto donis al la fideluloj la longe atenditan daton.

La 14an de januaro, fakte, la Papo rajtigis la promulgon de la dekreto pri la miraklo atribuita al la propeto de Johano Paŭlo la 2a kaj ĉi tiu akto konkludis la fazon antaŭ la beatproklamo. Oni agnoskis mirakla la resaniĝon el “parkinsona morbuso” de fratino Marie Simon Pierre Normand, religiulino de la instituto de la etaj monaĥinoj por la katolikaj patrinecoj.

En 2001 oni diagnozis al ŝi tiun malsanon, la saman de Papo Wojtyła: kiam li mortas, la parkinsonaj simptomoj en fratino Marie Simon Pierre preskaŭ abrupte pligraviĝas. Ĉiuj ŝiaj kunfratinoj komencas senĉese preĝi, aparte per naŭtaga preĝo per kiu oni petas la propeton de Johano Paŭlo la 2a. La resaniĝo okazos en la nokto inter la 2a kaj la 3a de junio 2005, rakontas emociplena fratino Marie Simon Pierre: «Matene de la 2a de junio mi estis tute senfortigita, elĉerpita, mi ne plu eltenis. Tiun tagon mi petis ke mi ĉesu mian asistadon en la naskejo. Sed kunfratino diris al mi, ke Johano Paŭlo la 2a ankoraŭ ne diris la lastan vorton. Ni longe parolis en ŝia kabineto, en etoso tre trankvila kaj paca, kaj tie ŝi petis al mi skribi la nomon de Johano Paŭlo la 2a sur paperfolio». Fratino Marie Simon Pierre sciis, ke ŝi ne plu kapablas skribi. Tio, kio rezultas estas nelegebla. Sed vespere, post la vesproj, ŝi sentas nerezisteblan volon skribi. Kaj ĉi-foje tio, kion ŝi skribas, estas legebla. Je la 4a kaj duono matene, post nokto nekutime trankvila, ŝi ellitiĝas kaj ĉio jam ŝanĝiĝis. «Mi tuj sentis ke io okazis, ke mi ne plu estis la sama». Per korpa facilmoveco kiun ŝi ne plu memoris, ŝi rapide iras preĝi fronte al la sanktega Eŭkaristio.



ĉefe estas infano, malgranda, bezonanta atenton, zorgemon, amon: tiu infano estas



Jesuo, tiu infano estas Dio mem kiu volis veni surteren por montri al ni kiom Li amas nin, Li estas Dio kiu fariĝis kiel vi infano por diri al vi ke Li estas ĉiam apud vi kaj por diri al ĉiu el ni, ke ĉiu infano portas lian vizaĝon.

Nun, antaŭ ol fini, mi ne povas ne plivastigi mian elkoran saluton al la tuta personaro kaj al ĉiuj malsanuloj de ĉi tiu granda malsanulejo. Mi kuraĝigas la diversajn iniciatojn por la bono kaj la volontuladon, samkiel la instituciojn kiuj kvalifikas la sindevigon je la servo al la vivo; mi pensas aparte, en ĉi tiu okazo, al la internacia scienca instituto “Paŭlo la 6a”, kiu celas antaŭenpuŝi la respondecan generadon.

Denove dankon al ĉiuj! La Papo amas vin!



12an de februaro 1931 – 2011

LA 80-JARIĜO DE RADIO VATIKANA

*el ondoj al bitoj: kiam la Papoj
venkis la babelon de lingvoj*

Mikrofono por plilaŭtigi en la mondo la voĉon de la Papoj, por raporti pri la vivo de la Eklezioj de ĉiuj lokoj de la planedo, por defendi la kristanan fidon kontraŭ tiuj, kiuj taksas ĝin superita aŭ malkomforta.

Ekde 80 jaroj generacioj da ĵurnalistoj, teknikistoj kaj aliaj laborantoj ĉiutage laboras en Radio Vaticana por plenumi specifan servon al la kristana fido. Kun Benedikto la 16a estas 7 la Papoj kiuj uzis tiun rimedon, kiun la unua el ili Pio la 11a difinis “potenca materia rimedo por la disvastigo de la Ideo”, t.e. de la Evangelio.

Okdek jaroj da historio montras nekontesteblan fakton de Radio Vaticana: la plej moderna teknologio neniam tordis ĝian plej malnovan animon. Nek la pezoj de la historio malrapidigis ĝiajn mesaĝojn: la Radio de la Papo volas paroli pri la ĉielaj aferoj al tiuj, kiuj estas sur la tero, sen distingo. Kaj volas fari tion ĉi per kiom eble plej multaj lingvoj, kvazaŭ por sankcii la malvenkon de Babelo, kie la malsameco de idiomoj malebligis kompreni Dion, dum la konsento per kiu hodiaŭ laboras la pli ol 40 lingvoj fronte al la mikrofonoj povas helpi trovi la senton de tiu perdita unueco.

La granda historio komenciĝis je la 16.40 de la 12a de februaro 1931. La 56-jaraĝa Guglielmo Marconi – fama fizikisto, realiganto de la instalaĵoj de la nova radiostacio - mem anoncis: “Post kelkaj momentoj, la Sankta Patro inaŭguros la Radiostacion de la Vaticana

Urbo... Dum preskaŭ 20 jarcentoj la Papo aŭdigis la vorton de sia Di-devena instru-rajto; sed ĉi tiu estas la unua fojo, en kiu lia persona voĉo povas esti aŭskultata samtempe tra la tuta mondo”.

Kaj tuj la unua latinlingva radiomesaĝo de la Papo trakuris kaj kovris la tutan terglobon: “Ĉar pro dia mistera plano - diris la Papo - ni sekvis la apostolon Petron, kiu ricevis kun la aliaj la dian taskon prediki al ĉiuj popoloj kaj al ĉiuj kreitaĵoj, ni adresiĝas al ili ĉiuj per la vortoj mem de la Sankta Skribo: Aŭdu, ho ĉieloj... aŭskultu la tero... aŭdu ĉiuj popoloj...”.

Komence, do, estis la papa instruo “per radio”: 5 el la 7 voĉoj de la Papoj de la radio vojaĝos nur per la hercaj frekvencoj. Per tiu nevidebla komunikilo oni verkas paĝojn de historio, kiel la radiomesaĝon de la 24a de aŭgusto 1939 per kiu Pio la 12a invitis la popolojn rezigni je milito “ĉar nenion oni perdas per la paco, sed ĉion oni povas perdi per la milito”. Aŭ oni verkas paĝojn de espero: tiujn de la 1.240.728 mesaĝoj, kiujn Radio Vaticana lanĉis en la periodo 1940-1946 ebligante al patrinoj, edzinoj kaj fianĉinoj havi informojn pri siaj viroj, malaperintaj aŭ milit-kaptitaj. Ĝis kiam, post la restarigo de paco, alvenis la momento reveni al la

komencaj celoj, plivastigi la horizontojn, certigi al la voĉo de la Papo kaj de la Eklezio pli grandajn distancojn.

Sed pli potencaj sendiloj kaj antenoj (precipe por mezaj ondoj) estis bezonataj. Tamen, la Vatikana Ŝtato montriĝis tro malgranda kaj sufokita en la centro de Romo; tiel, oni decidis starigi tute novan stacion ekster la urbo. Kiel sidejo estis elektita la zono Santa Maria di Galeria, 18 kilometrojn norde de la urbo.

En 1952 estis subskribita konvencio kun Italio, kaj komenciĝis la laboroj por starigo de radiostacio sur la elektita areo, 10-oble pli vasta ol Vatikano. La nova stacio estis inaŭgurita de Papo Pio la 12a en 1957, kiu en tiu okazo plenumis la plej longan vojaĝon de sia papeco, de Kastelgandolfo al Santa Maria di Galeria (proksimume 50 km: kiel ŝanĝiĝis la tempoj...).

La sesdekaj jaroj de la 20a jarcento estis la jaroj de la dua vatikana Koncilio pri kiu Radio Vatikana raportas komplete per 3000 horoj da elsendoj en 30 diversaj lingvoj. Samtempe ĝi klopodas inventi programojn kiuj portu trans la muroj, kie la Eklezio silentas aŭ estas en sklaveco, la blovon de la novaĵoj kiu spiras el Romo: religia historio,

Papo Pio la 11a kaj Guglielmo Marconi (staranta maldekstre) dum la inaŭgura tago de Radio Vatikana.



biblia kulturo, spiritaj pliprofondiĝoj. Kaj plie: la katekismo fragmente proponita ĉe la mikrofonoj al plenkreskuloj kaj infanoj kaj densa kritiko de la ideologioj kiuj servas al diktaturoj.

Entute, de la komenco, Radio Vatikana ĉiam realigis “edukajn” elsendojn. Kroniko aperis, sed ĝi estis esence limigita je la vaticanaj eventoj. Papo Paŭlo la 6a ŝanĝas ĉi tiun strukturon. En la etero kie pli kaj pli svarmas voĉoj, Papo Montini volas, ke Radio Vatikana ne plu estu nur laŭtparolilo de la paŝtista instruo, sed opini-faranto, influa, kiu diru sian opinion pri tio, kio okazas en la mondo.

Johano Paŭlo la unua, la Papo el aminda trajto kiu pasis “kiel meteoro en la ĉielo de la Eklezio”, ne sukcesis eluzi “sian” Radion, ĉar supera plano aranĝis alimaniere, sed la celoj ja estis: dum parolado al ĵurnalistoj tuj post la elekto li promesis “specialan atenton kaj sinceran, honestan kaj efikan kunlaboron kun la amas-komunikiloj”.

Poste, alvenas de malproksime la Papo

Radio Vatikana en la vaticanaj Muzeoj

kiu igos la mondon pli proksima. Johano Paŭlo la 2a atingas lokojn ne vizitatajn de posteulo de Petro, traŭrante ilin kiel atleto de Dio kaj kiel viro kurbigita de la kruco. Radio Vatikana postsekvas lin popaŝe, laŭlonge de tiu unu miliono kaj pliaj kilometroj traŭrataj dum la eksteritaliaj vojaĝoj, kolektante kaj konservante la milojn da horoj de liaj paroladoj. La Radio restas ĉiam je lia flanko: kiam li estas vundita la 13an de majo 1981 kaj kiam releviĝas la Eklezio post 1989, kaj ankoraŭ, kun la feliĉegaj amasoj da fideluloj de la granda Jubileo (6000 horoj da elsendoj) kaj kun tiuj plorantaj, vespere de la 2a de aprilo 2005.

Kaj poste komenciĝis la “diĝita” paŝtista instruo. Nia epoko estas kaptita de anglalingvaj sigloj; ĉiu el ili konsistigas padon de la granda antaŭenpaŝado farita de komunikado dum la lastaj 15 jaroj, ekde kiam Interreto koncentrigis la mondon en unu ĉambrom. Bitoj, retleteroj, interreto, kunligo, blogo, podkasto, YouTube, Twitter kaj tiel plu, navigante en magmo de senfina vortaro. La Radio adaptiĝas: nun la voĉo de la Papo “forlasas” pli kaj pli ofte la ondojn por vojaĝi tra la kabloj. Sed ĉiam en ĉiuj eblaj lingvoj.



Kaj ĉiam invitata de la Papoj, dum ili instigas ĝin esti avangarda, ankaŭ memori la malnovan principon. Kiel faris Benedikto la 15a la 3an de marto 2006, kiam li vizitis la Radion, kiu fariĝas 75-jaraĝa: “Daŭrigu, karaj geamikoj, agi en la granda areopago de la moderna komunikado (...) Sed ne forgesu, ke, por plenumi la mision konfiditan al vi, necesas certe taŭga teknika kaj profesia formiĝo, sed necesas antaŭ ĉio ke vi senĉese kultivu en vi spiriton de preĝado kaj de fidela aliĝo al la instruoj de Kristo kaj de lia Eklezio”.

La 80an datrevenon de Radio Vatikana reliefigas en la vaticanaj Muzeoj ekspozicia spaco, kiu ebligas al vizitantoj ekkoni la “Radion de la Papo”, ĝian historion, kiel ĝi laboras kaj kiel ĝi alfrontas la multajn komunikilajn defiojn de la nuntempo.

La RV-spaco okupas unuarangan pozicion ĉe la enira halo de la Muzeoj, kun fona granda vitralo kiu surhavas la nomon “Radio Vatikana” skribitan en la 40 ĉefaj lingvoj, kiujn la radio uzas (inkluzive de Esperanto) kaj la emblemon kreitan por memori la sep



Papojn de la Radio. La ekspozicion oni povos viziti ĝis la 12a de februaro 2012 senpage kaj sen devi enviciĝi kun la multnombraj vizitantoj de la Muzeoj.

Kurba muro farita el ligno kaj aluminio, kiu volas simboli la ondojn elsendatajn de la du antenoj de la elsendocentro en Santa Maria di Galeria, konturas la ekspozician spacon. Diversaj objektoj el la muzeo de RV estas ankaŭ ekspoziciataj: mezurilo de radioondoj, telekso kun tajpilo por morsa kodo, kurtonda ricevilo, pluraj mikrofonoj uzitaj de la Papoj kaj la bronza busto de Guglielmo Marconi, kiu konstruis la Radion laŭ invito de Papo Pio la 11a, kune kun maketo de Palaceto Leo la 13, sidejo de la kontrolcentro en la vaticanaj ĝardenoj.

↳ *daŭrigu en paĝo 13*



64a IKUE KONGRESO “Nia 64a” Zagreb, Kroatio de la 16a ĝis la 22a de julio 2011

“Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo.
Kaj eĉ unu haro de via kapo ne pereos”
(Luk 21, 17-18)

Subtemoj:

- Persekutoj kontraŭ kristanoj en la mondo;
- La atesto de la martiroj dum la historio de la Eklezio;
- La signifo de la martirigo;
- La atesto de Johano Paŭlo la 2a en la jaro de lia beatpro-

klamo (Pardoni kaj Pardonpeti; 25-jaroj de la Spirito de Asizo, k.a.)

- Interreligia dialogo en dokumentoj de la Katolika Eklezio

- Dialogo por la repacigo: kiun rolon havas Esperanto?

Aldona temo: Privataj laikaj organizoj en la Eklezio: rajtoj-devoj

KONGRESEJO: la ĉefepiskopa granda seminario estis fondita la 15an de julio 1563 kaj kiel unua jaro de funkciado estis notita 1576. De tiam dum pluraj jarcentoj la seminario estas loko de edukado de junuloj kiuj decidis dediĉi sian vivon servante la popolon en la nomo de Jesuo. Ĝis antaŭ deko da jaroj en la konstruaĵo troviĝis ankaŭ teologia fakultato.

Post kompleta renovigo (inter la jaroj 2005 kaj 2007) la zagreba ĉefepiskopo kardinalo Josip Bozanić decidis ke parto de la seminaria domaro iĝu ĉefepiskopa paŝtista instituto kaj ke ĝi estu dediĉita al konstanta edukado de klerikoj, sed ankaŭ de laikoj. En tiu parto troviĝas granda amfiteatra salono kun 300 sidlokoj, kaj du malpli grandaj. La uzo de la granda salono estas planata por la inaŭguro kaj por aliaj programeroj. La salonoj estas ekipitaj per ĉiuj modernaj tehnikajoj por diversspecaj prezentoj.

La seminario troviĝas tuj apud la katedralo. Tio signifas ke ĝi troviĝas en la koro de la urbo kaj estas facile atingebla. Je pieddistanco troviĝas pluraj vidindaĵoj, bazaro, butikoj, kafejoj, ktp.

Gravas la mencio, ke neniam ĝis nun en la seminario okazis iu laika plurtaga evento.

Je nia dispono estos: dormejo (moderne ekipitaj ĉambroj je hotela nivelo): 17 dultitaj ĉambroj kaj 95 unultitaj ĉambroj, ĉiuj kun banĉambro; manĝejo ĉ. 200 sidlokoj; kapelo kun etaj orgenoj; komputilejo: ses komputiloj kun retkonekto. En la Instituto estas facile kaptebla sendrata reto por tiuj kiuj portas propran komputilon; parkejo. Eniro en la seminario eblos ĝis malfruaj vesperaj horoj.

ATINGEBLECOJ. Zagrebon mem oni facile atingas trajne, buse kaj aviadile.

Utilaj ligoj: Kroata fervojo www.hznet.hr; busa stacidomo www.akz.hr; Zagreba flughaveno www.zagreb-airport.hr. Aparte ni atentigas pri la trajnbiletoj por la nokta trajno de Venecio-Zagreb-Venecio, kaj favorplezaj flugbiletoj de diversaj kompanioj. Se vi bezonas helpon/konsilon ne hezitu skribi.

PROVIZORA KONGRESA PROGRAMO

Unua oficiala servo: *vespermanĝo la 16an de julio*. Lasta oficiala servo: *la 22an de julio pilgrimo al diocezo Sisak (tie okazos kaj meso kaj fermo de la kongreso)*

sabato, 16/7 — *alveno de kongresanoj ĝis la 17a horo; akcepto kaj loĝigo; meso, kunsido de la estraro, nokta adorado en la kapelo*

dimanĉo, 17/7 — *inaŭguro, prelegoj, meso, preĝo ĉe la tombo de beata Stepinac, koncerto*

lundo, 18/7 — *pilgrimo al Ludbreg okaze de la 600a datreveno-jubileo de la eŭkaristia miraklo tie okazinta (fronte al dubanta pastro la konsekrita vino dum Meso fariĝis sango). Vizito al la fokolar-urbeto en Križevci kaj vizito al la komunumo “Cenacolo”*

mardo, 19/7 — *ĝenerala kunveno de IKUE, pilgrimo al Krašić (vizito al la memorĉambro kie mortis beata kardinalo Alojzije Stepinac)*

merkredo, 20/7 — *prelegoj, libervola volontula agado (interkonsentita, eksterkongreseja), libera vespero*

ĵaŭdo, 21/7 — *prelegoj, preĝo ĉe la tombo de beata Ivan Merz, meso por mortintaj IKUEanoj kaj subtenantoj de IKUE, distra vespero*

vendredo, 22/7 — *pilgrimo al diocezo Sisak, dankmeso kun la episkopo, prelego de la episkopo, fermo de la oficiala programo. Reveno al Zagrebo planata en malfrua posttagmezo.*

Kontraŭ aldona pago eblos tranokti NUR unu plian nokton, kaj foriri sabaton, 23an de julio post la matenmanĝo, sed plej malfrue ĝis la 10a horo. Tamen tion oni devos ĉe la aliĝo menci. Veni tagon pli frue ne eblas.

sabato, 23/7 — *meso*

Ĉiutage estos enprogramitaj Matenaj laŭdoj, Rozario, Vesperaj Preĝoj,

Noto: *La programo estas provizora, ĉar necesas fintraktoj de la horoj pri la meso en la katedralo, kaj ankaŭ en pilgrimlokoj. Do, eblas ŝanĝo inter la tagoj.*

ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ (kontrakto) BONVOLU ATENTE LEGI

- La **aliĝo** validas post la ricevo *kaj* de la aliĝilo *kaj* de la aliĝkotizo. Ĉiuj aliĝintoj ricevos la konfirmon de aliĝo kaj informojn kiel atingi la kongresejon. La aliĝkotizo ne inkluzivas loĝadon, manĝojn, transportadon (ekz. dum pilgrimoj) nek eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas sube. La aliĝkotizo inkluzivas nenian asekuron.
- La **mendo de la loĝado** (plentempa partopreno) estos traktata nur post la alveno de la NEPRA antaŭpago de 20% de la ŝuldata sumo laŭ landa deveno kaj dato de aliĝo. Reston de la sumo oni povas pagi al la banka/UEA kontoj, antaŭ la komenco de la kongreso, aŭ surloke, ĉe la akceptejo, sed nur per kontanta mono en eŭroj (ĉekoj kaj kreditkartoj ne estos akceptataj). Kompreneble oni povas ankaŭ pagi la tutan koston de loĝado samtempe kun la aliĝo.
- Pro **limigitaj loĝlokoj** bv. kiel eble plej frue sendi la mendilon kaj antaŭpagon.
- Prioritaton en la mendo de du-litaj ĉambroj havos geedzoj.
- Ni ne povos decidi pri kunloĝado de kongresano kiu deziras 2-litan ĉambron sen indiki kunloĝanton. En ĉi tiu kazo, oni invitos pagi unulitan ĉambron.
- Post ricevo de la mendo la organizantoj tuj komunikos al vi ĉu la elektita kategorio estas konfirmita.
- **Se vi pagis kaj poste ne plu povas partopreni**, NUR la antaŭpago por la loĝservoj estos transdonebla al alia persono, kondiĉe ke ĉi-lasta pagis la aliĝ-kotizon. La antaŭpago por la loĝservo pro la nealveno estos redonita nur se oni sukcesos plenigi aŭ anstataŭigi la lokon liberigitan de la ne-plu-partoprenanta kongresano. Ĉiuokaze el la redonita sumo pro organizaj kialoj oni forprenas 10 EUR.
- **La unuopaj kostoj de la tag- kaj vespermanĝoj** rilatas al tiuj kongresanoj kiuj loĝos aliloke kaj deziras ĉeesti la komuna(j)n manĝo(j)n aŭ partopreni en la pilgrimoj. Tiuj kiuj jam ĉe la aliĝo estas certaj por kiuj tagoj ili deziras ricevi manĝojn indiku tion. Kvankam eblos surloke (unu tagon pli frue) mendi unuopan manĝon, ni petas ke maksimume ĝis la 1a de junio vi komuniku viajn mendojn de manĝoj.
- Se Vi mendas la **plian restad-tagon** post la fino de la kongreso (nokto inter vendredo la 22an de julio kaj sabato la 23an de julio), Vi devos liberigi la ĉambron ene de la horo 10a de sabato la 23an de julio.
- Se vi interesiĝas pri la hotelaj loĝeblecoj en la proksimeco de la kongresejo bv. tuj komuniki tion al la organizantoj. Ni ne povas certigi helpon depost la 1a de majo. Laŭ esperantista helpemo, ni tamen atentigas ke en Zagrebo la averaĝa prezo por unu tranokto/matenmanĝo estas 70 EUR por persono.
- La restadkostoj estas faritaj surbaze de la solidara principo. Do, iuj pagas, ke aliaj pagu malpli. Tial oni ne akceptos "turistojn".
- **Programkontribuoj:** se vi volas kontribui al la programo, bv. klare priskribi vian proponon kaj al kiu programero/temo ĝi rilatas (sufiĉas ĝis maks. dek fraza resumo de la kontribuo). Proponojn vi sendu antaŭ la 15a de majo. Se via kontribuo estos akceptata, ĝi povas daŭri ĝis 15'. Se Vi proponas prelegon, vi estos petata liveri ĝian tekston por posta publikigo. Por la fina distra vespero, ĉar kutime anonciĝas multegaj helpantoj, tiu tempodaŭro estas limigita je 10 minutoj. Ĉiuokaze, bv. sciigi ĉu por via prezento necesas apartaj ilaroj por ke la prezento mem estu kiel eble plej glata.
- **Ĉeesto en la kongresejo:** la domo kiu gastigas la Kongreson havas specifajn konduktregulojn, komunajn al ĉiuj religiaj domoj. Oni petas respekti ilin, aparte la malpermeson fumi en internaj ĉambroj, la nepran silenton dum noktaj horoj, la ne uzon de gladiloj kaj de hejtiloj/boligiloj en la ĉambroj. Detalojn oni konigos surloke.

PAGMANIEROJ

BANKO: Pere de la itala poŝt-banka konto:

IBAN: IT34 H076 0103 2000 0002 3290 000 - BIC/SWIFT: BPPITRXXXX

je nomo: UNIONE INTERNAZIONALE CATTOLICA ESPERANTISTA

adreso: Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 ROMA RM (Italia)

ATENTU: 1) eŭropanoj de la landoj kies bankoj aliĝas al sistemo "SEPA" ne pagas komisionojn por alsendi la monon. Oni petu informojn ĉe sia banko; 2) oni skribu precize la nomon: "**Unione internazionale cattolica esperantista**". Oni ne uzu mallongigojn, nek la siglon IKUE, nek alian akronimon: oni riskas, ke la pago ne estu farita.

UEA: konto "ikue-v" de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista - Romo, Italio

KOTIZTABELOJ

Tarifo A: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo (escepte de Slovenio); ĉiuj landoj de Azio (escepte de Arabio, Israelo, Japanio, Malajzio, Sudkoreia Respubliko), Afriko (escepte de Sudafriko), Latina Ameriko, Oceanio (escepte de Aŭstralio, transmaraj teritorioj de Francio). **Tarifo B:** Ĉiuj mondaj landoj ne inkluzivitaj sub A.

PLENTEMPAJ PARTOPRENANTOJ

KONGRESA ALIĜKOTIZO (*nerepagebla nek netransdonebla!*)

	Tarifo A	Tarifo B
ĝis la 15-a de majo 2011	25 EUR	50 EUR
de la 16-a de majo 2011	40 EUR	70 EUR
Apogkotizo: 50% de la kotizo valida post la 15a de majo <i>(por tiuj, kiuj ne partoprenas la kongreson, sed deziras ricevi la kongresan dosieron)</i>		
Infanoj ĝis 8 jaroj aliĝas senpage	NE-IKUEano krompagas 15 EUR pliajn por plena partopreno	

La aliĝkotizo ne inkluzivas asekuron, loĝadon, manĝojn, transportadon (ekz. dum pilgrimoj) nek eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas ĉi-sube.

LOĜKOTIZO (*por unu persono, por la tuta kongresa periodo*)

	Tarifo A	Tarifo B
en 1-lita ĉambro:	240 EUR	325 EUR
en geedza ĉambro:	220 EUR	295 EUR

La prezo inkluzivas: 6 tranoktadojn; 5 vespermanĝojn; 6 matenmanĝojn; 6 tagmanĝojn; bustransporton dum pilgrimadoj kaj necesajn enirbiletojn. Okaze de prelegoj dum paŭzoj estos servata kafo kaj simpla suko (diverspecajn varmajn kaj malvarmajn trinkaĵojn oni povos kontraŭ pago ricevi ĉe la aŭtomato aŭ akceptejo).

PARTATEMPAJ PARTOPRENANTOJ

Partatempaj partoprenantoj pagas tagan aliĝ-kotizon por ĉiu tago de ĉeesto kaj la unuopajn uzatajn servojn (manĝojn, transportadon, enirbiletojn k.s.) laŭ la jenaj tarifoj:

aliĝkotizo por unu tago:	Tarifo A: 8 EUR	Tarifo B: 10 EUR
--------------------------	-----------------	------------------

PREZOJ DE UNUOPAJ SERVOJ

por tiuj, kiuj pagas plenan aliĝkotizon, sed ne loĝkoton aŭ estas partatempaj partoprenantoj:

unu tagmanĝo en la kongresejo: 8 EUR	unu vespermanĝo en la kongresejo: 6 EUR
Pilgrimo al Ludbreg: 25 EUR - Pilgrimo al Krašić: 15 EUR - Pilgrimo al diocezo Sisak: 20 EUR <i>la prezoj inkluzivas: manĝojn, transportadon, enirbiletojn</i>	

PLILONGIGO DE UNU TRANOKTO+MATENMANĜO *vendredo 22an de julio/sabato 23an de julio*

	Tarifo A	Tarifo B
en 1-lita ĉambro:	25 EUR	35 EUR
en geedza ĉambro:	20 EUR	30 EUR



64a IKUE KONGRESO Zagrebo, Kroatio, 16. – 22. 07. 2011

ALIĜILO KAJ MENDILO

Sendu rete al: **kroatio2011@gmail.com**, fakse: +385 1 37 45 052 aŭ per ordinara poŝto al la adreso: **Marija Beloŝević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio**

Ĉiu aliĝinto uzu apartan aliĝilon. La aliĝilon/mendilon bv. plenigi GRANDLITERE.

PERSONA(J) NOMO(J)	FAMILIA NOMO
ADRESO (strato, domnumero)	poŝtkodo, urbo, ŝtato
NASKIĜDATO	TELEFONO
RETADRESO	FAKSO
Mi estas vegetarano: JES NE	Mi estas handikapito: JES NE
Mi planas alveni (dato, transportilo)	Mi planas forveturi (dato, transportilo)

Mi mendas servojn (metu <input checked="" type="checkbox"/>) 1-lita ĉambro <input type="checkbox"/> 2-lita ĉambro <input type="checkbox"/> por la tuta kongresa periodo	Mi estas parta partoprenanto kaj mi mendas manĝojn (metu <input checked="" type="checkbox"/>)						
							pilgrimo(j)n
dato	16/7	17/7	19/7	20/7	21/7	18/7	
TM						19/7	
VM						22/7	

Mi deziras dividi ĉambron kun	
Mi havas apartan dieton	
Al la programo mi pretas kontribui per: <i>(ev. aldonu plian folion por la priskribo)</i>	
Ĉu vi pretas, se necese, surloke helpi en aranĝado de la salono kaj/aŭ prizorgo servoj en la manĝejo <i>(ekz.: kolekto de teleroj k.s.)</i>	JES NE
Ĉu vi pretas partopreni en la kongresa koruso?	JES NE
Ĉu vi pretas, se estos okazo, partopreni eksterkongresejan voluntulan ĝis 2-horan agadon?	JES NE
Pliilongigo de unu tranokto vendredo/sabato	JES NE
NOTO:	

Mi pagas:

- Kongreskotizon = _____ EUR
- Loĝservojn/antaŭpagon = _____ EUR
- Libervola donaco por la Kongresa Kaso = _____ EUR
- SUME = _____ EUR

Mi pagis entute _____ EUR al la: Banka konto de IKUE UEA konto de IKUE

Mi legis, komprenis kaj akceptas la partopren-kondiĉojn:

Dato: _____

Subskribo: _____



↳ *daŭrigo de paĝo 8*

Kelkaj grandaj fotoj prezentas la 80 jarojn de vivo kaj spertoj de RV: ekde historiaj fotoj ĝis tiuj, kiuj montras la nunan retpaĝaron kaj aliajn teknologiajn progresojn. Estas fotoj de la unua perradia kunligo farita de Papo Pio la 11a februare de 1931 inter la Vatikana Civito kaj Kastelgandolfo, samkiel fotoj de la nuna ĉefsido en Palaco Pio (kiu staras mezvoje inter la baziliko de sankta Petro kaj Kastel sankta Anĝelo en Romo), de la kontrola centro en Palaceto Leo la 13a kaj de la elsendocentro en Santa Maria di Galeria.

Eblas spekti filmojn pri la kronologiaj eventoj en la historio de RV kaj pri ĝia muzeo; interaga tuŝebla ekrano ebligas al vizitantoj vidi la 7 Papojn de RV (Pio la 11a, Pio la 12a, Johano la 23a, Paŭlo la 6a, Johano Paŭlo la 1a, Johano Paŭlo la 2a, Benedikto la 16a) kaj aŭskulti iliajn voĉojn. Radioaparato, kiu imitas tiujn de 1930, havas, anstataŭ la frekvenc-tabelon, komputilan ekranon per kiu la vizitantoj povas konsulti la retpaĝaron de RV.

(fotoj: CS)



Sur la vitralo aperas la nomo de la Radio interalie en Esperanto



Mikrofonoj uzataj de la Papoj



Tajpilo por morsa kodo



Maketo de Palaceto Leo la 13a, unua sidejo de RV en la vaticanaj ĝardenoj

Fine de 2010 la mondo spektis la unuajn popolajn protestojn en norda Afriko: unue en Tunizio kaj aliaj arabaj landoj, poste, komence de la nuna jaro, en Egiptio. En tiu lando la kontraŭregistaraj protestoj iom deturnis la atenton de la amaskomunikiloj el la persekutadoj okazantaj kontraŭ la kristanoj de tiu lando: dum la solenado de jarkomenco la kopta preĝejo de Aleksandrio estis atakita kaj el la tie preĝantaj fideluloj 23 mortis kaj dekoj da ili vundiĝis. Plia tragika evento, kiun la kristanoj de Egiptio travivis dum sia longa historio: pastro Stefano Hawkes Teeple revuas tiun historion.

La Koptoj

hieraŭ

kaj


hodiaŭ

La unua kaj plej grava demando estas, kiuj estas la Koptoj? Ili estas tutsimple la origina popolo de Egiptio. Kaj ni povas facile vidi tion facile per la konsonanta radiko de ilia nomo.

E G I P T i o

K o P T o

La tri konsonantoj de *kopto*, K-P-T, estas pli malpli la samaj de la nomo *Egiptio* aŭ *egipta*, ĉar G kaj K estas vokalgita kaj nevokalgita formoj de la sama sono. Do la koptoj estas la popolo, kiu loĝas en Egiptio de jarmiloj. La lingvon, kiun oni parolis en plej antikva Egiptio, oni skribis per hieroglifoj, kiel oni povas vidi ekzemple sur la egiptaj obeliskoj en Romo, kiujn la romianoj forportis el Egiptio. Ekde la malfrua romia periodo,



oni skribas la koptan lingvon per formo de la greka alfabeto, sed temas pri la sama lingvo.

E g i p t i o estas vasta teritorio je la nordorienta angulo de Afriko, el preskaŭ precize miliono da kvadrataj kilometroj. La

vasta plimulto da la lando estas grandega, sekega dezerto, kiu povas vivsubteni nur tre malmultajn enloĝantojn. Tamen — kaj tio ĉi estas grandega kaj kontrasta *tamen* — tra Egiptio fluas la rivero Nilo el la koro de Afriko ĝis sia elfluo en la Mediteraneon. Dum milionoj da jaroj la Nilo portis la riĉan teron de centra Afriko en siaj ondoj. Per la oftegaj inundoj la Nilo deponis tiun riĉan, fekundan teron en Egiption. Tial, kvankam multe da Egiptio produktas malmulton agrikulturan, la longa mallarĝa strio de la nila valo estas unu el la plej abundaj kreskejoj de la tuta mondo. Egiptio estis unu el plej gravaj nutraĵkultivantoj de la Romia Imperio kaj ankaŭ de la Bizanca Imperio. Oni ĝuste nomas Egiption “la donaco de la Nilo”.

El multaj dialektoj de la kopta lingvo, du fariĝis tre gravaj en la kristana periodo: la sahida en alta Egiptio kaj la bohajra en malalta Egiptio. Ni memoru ke malalta signifas “apud la maro” do norda Egiptio. Tial alta Egiptio estas suda Egiptio. Finfine superregis la bohajra kaj ĝi estas la liturgia lingvo de la kopta eklezio ĝis hodiaŭ.

En la 4ajarcento a.K. la Makedona reĝo Aleksandro la Granda konkeris Egiption kaj unuigis ĝin al sia vasta internacia imperio de Mediteraneo ĝis Himalajo. Li konstruis novan grandegan ĉefurbon ĉe la elfluejo de la Nilo kaj sekve de la oftega malhumila stilo de imperiestroj

Aleksandro nomis ĝin “Aleksandrio” en la jaro 332-331 a.K.. Tiu urbo fariĝis gravega centro de la antikva mondo kaj tie naskiĝis la tre grava literatura, scienca kaj kultura movado de helenismo, tio estas la vasta internacia komunumo, kiu uzis la grekan lingvon ekster la greka patrio. Pro tio, la juda religio havis grandan influon ankaŭ ekster la hebrea popolo ĉar grupo de specialistoj en Aleksandrio tradukis la judan Bibliion en la grekan, kiun ni nomas la “Septuaginto”, kiun poste adoptos la kristanoj kiel sian Malnovan Testamenton. Pro la greka helenismo, sankta Paŭlo kaj la aliaj unuaj kristanaj misiistoj predikis en la greka. La kristana Biblio, la Nova Testamento, verkiĝis en la greka. Kaj la greka estis la ĉefa lingvo de la kristanaj diservoj eĉ en Romo ĝis la 4a jarcento.

Aleksandrio havis tre vigran intelektulan vivon pro sia Biblioteko,



la plej granda kolekto da libroj kaj da dokumentoj de la antikva mondo. Ĝi estis kvazaŭ granda universitato, kie oni studis la teologion, la filozofion, la historion, la fizikajn sciencojn kaj la literaturon. Tie troviĝis tre diversaj internaciaj komunumoj: egipta-kopta, greka, latina kaj hebrea. En la urbo mem superregis la greka lingvo, sed en la kamparo la simpla popolo parolis kaj vivis per la kopta lingvo.

Kristanismo venis al Aleksandrio kaj al cetera Egiptio tre frue. Malnovaj tradicioj ligas la unuan kristanan predikadon al sankta Marko, al kiu oni atribuas la duan Evangelion. Kiel en la plimulto de la Romia Imperio kaj la Mediteranea regiono, kristanismo fariĝis la precipa religio dum la 4a jarcento, unue en la urboj, poste en la kamparo. Estante — ekde Aleksandro la Granda — ĉefurbo, Aleksandrio fariĝis ankaŭ la ĉefsidejo de la kristana eklezio en Egiptio.


Kiam la plimulto akceptis kristanismon, naskiĝis reago kontraŭ la nova, popola, malforta kristanismo de la urboj. Kiuj sopiris je pli malmola, postulema kristanismo, simila al tiu de la tempo de la martiroj, tiuj forlasis la urban eklezion kaj iris al la dezerto vivi sole iom proksime unu al la aliaj. Pro la soleco, oni nomis ilin *monaĥoj*. La plej konata el la fruaj monaĥoj estis sankta Antonio la Granda (251-356), kiu loĝis en diversaj lokoj en la egipta dezerto. Baldaŭ la monaĥoj ne plu loĝis sole, sed organizis komunumojn, monaĥejojn. Granda monaĥeja organizanto estis sankta Pakomjo (292-348), kiu starigis sian unuan monaĥejon ĉe Tabennisi, ankaŭ en la egipta dezerto. Ekde tiuj komencoj, la vasta movado de la kristana monaĥismo kaj la vivo de religiaj ordenoj naskiĝis kaj poste transiris al aliaj landoj, sed dum jarcentoj kiu volis vidi la veran puran kristanan monaĥismon, tiu iris al la dezertoj de Egiptio.

Dum la kristanaj polemikoj de la 5a jarcento, la plimulto de la kopta eklezio en Egiptio malakceptis la novan vortaron kaj la novan teologion de la koncilio de Kalcedono (jaro 451). La koptoj, la armenoj, la antioĥiaj siroj kaj la etiopianoj — kiuj kune tiutempe estis la duono da la kristanoj en la mondo — rifuzis la decidojn de la koncilio kaj restas ĝis

hodiaŭ “Antaŭ-kalcedonaj” aŭ “Antikvaj Ortodoksaj Eklezioj”. Iliaj kalcedonaj malamikoj nomis ilin “Monofizitoj”.

La registaro de la Romia aŭ Bizanca Imperio regis Aleksandrion kaj la registaro aprobis la konciliajn decidojn de Kalcedono. Tial oni starigis novan, pli malgrandan ortodoksan Eklezion, kies ĉefo estis nova Patriarko de Aleksandrio. La registaro devigis la malnovan Patriarkon de Aleksandrio forlasi la ĉefurbon kaj li translokiĝis al monaĥejo en la dezerto. Do estis ortodoksa Patriarko de Aleksandrio en la urbo mem kaj estis kopta ortodoksa Patriarko de Aleksandrio en la dezerto. La vasta plimulto da la egiptaj kristanoj sekvis la koptan Patriarkon kaj tiu Eklezio pli kaj pli ekuzis la koptan lingvon, malakceptante la grekan, kiu estis la lingvo de la fremda, imperia Eklezio. Tamen, eĉ hodiaŭ, multegaj preĝoj kaj himnoj de la kopta eklezio restas en la greka lingvo.

Dum la jaroj 600aj ekaperis en Arabio nova unudia religio: Islamo. Pro la apartaj organizaj kapabloj de ĝia fondinto, Mohamedo, la religio rapide disvastiĝis. Ankaŭ la dividita kaj tial tre malforta kristanaro helpis la finan konkeron de Egiptio en 639. Kun la konkero ankaŭ venis registara



Kopta skribo

influo de araboj. La araboj enkondukis kaj la islaman religion kaj la araban lingvon. Tiel komenciĝis la longa arabigo kaj la islamigo de Egiptio. Ĉar islamanoj havis fortajn privilegiojn, pagis malpli da impostoj kaj povis praktiki ian ajn profesion, tial komenciĝis longdaŭra malpliigo de la kristanoj. Kaj sub la islama registaro estis malpermesite al islamanoj konvertiĝi al la kristanismo. Forlasi la Islamon estas laŭ la Korano mortpuna krimo. Post la 13a jarcento la kopta lingvo perdis sian rolon kiel ĉefan lingvon de la ĉiutaga vivo, kvankam ĝi daŭre uziĝas en la kopta Eklezio.

Dum la jarcentoj, kvankam ili fariĝis malplimulto en sia propra lando, la koptoj restis grava elemento de la egipta socio. Ofte ili estas inter la plej kleraj kaj kapablaj kuracistoj, sciencistoj kaj advokatoj. Foje dum la Mezepoko, pli fanatikaj regantoj forpelis la kristanojn el la registaro de Egiptio. Plej ofte, kelkajn monatojn poste, la registaraj aferoj jam troviĝis en malordo. Do trankvile oni petis iom da konsilo ĉe unu aŭ du koptoj. Iom post iom ili revenis kaj denove la registaro funkciis pli bone.

Okazis plejparte maloftaj persekutoj kontraŭ kristanoj dum la unua islama periodo. Kvankam Islamo malpermesis konvertiĝon al kristanismo, la Korano leĝe promesas, ke tiuj, kiuj naskiĝas en jam kristanaj familioj, rajtas resti kristanoj. Efektive, kelkaj kristanoj, kiujn persekutis aliaj pli grandaj eklezioj, bonvenigis la arabojn, kiuj ilin protektis kontraŭ la persekuto.



La Patriarkoj de Aleksandrio (de maldekstre):

Lia Sankteco Papo **Shenūda la 3a**, kopt-ortodoksa Patriarko; Lia Beateco **Theódoros la 2a**, grek-ortodoksa Papo kaj Patriarko; Lia Beateco kardinalo **Antonios Naguib**, kopta katolika Patriarko.

Do, plej ofte, la kristanoj vivis pli malpli trankvile sub la islama regado ĝis la krucmilitoj (de la 11a ĝis 13a jarcentoj).

Tiam kristanoj el okcidenta Eŭropo provis — kaj dum iom da tempo ili sukcesis — konkeri la Sanktan Landon, kie vivis kaj mortis Jesuo. Tiuj teritorioj estis jam sub islama regado dum 500 jaroj. Post la malsukceso, la krucmilitistoj reiris al Anglio, Francio, Germanio kaj aliaj eŭropaj landoj, sed la koptoj devis resti en sia hejmlando. Tie la islama registaro ektaksis la koptajn kristanojn interna danĝero, kiun oni devas kontroli kaj zorgeme regi. Nova malamikeco ekkreskis inter islamanoj kaj kristanoj en Egiptio. Ekde tiu tempo, kelkfojaj persekutoj kontraŭ kristanoj ekaperas kaj detruas personojn kaj komunumojn.

Unu episkopo kaj malgranda grupo de koptoj aliĝis al la katolika Eklezio en 1714. Kiel aliaj orientkatolikaj eklezioj, la kopta



Preĝado de koptoj dum la protest-manifestacioj en Kairo (januaro 2011)

kaj havis apartan episkoparon. La Papo kreis Patriarkon de la koptaj katolikoj en 1899. Ekde tiam ekzistas tria Patriarko de Aleksandrio. Do, ni havas la kopt-ortodoksan Patriarkon de Aleksandrio, la grek-ortodoksan (aŭ simple ortodoksan) Patriarkon de Aleksandrio kaj fine koptan katolikan Patriarkon de Aleksandrio. La kopta katolika Eklezio estas tre malgranda kun 160.000 anoj en Egiptio kaj pliaj malgrandaj grupoj en aliaj landoj.

Hodiaŭ la kopta ortodoksa Eklezio estas la plej granda kristana Eklezio en Mezoriento. Ĝi havas eble 9 milionojn da membroj, sed neniu konas precize ilian nombron. Ili tamen estas granda malplimulto en la lando.

Dum la lastaj 20 jaroj persekutoj kontraŭ kristanoj — aparte tiuj faritaj de la Islama Frataro — mortigis milojn da kristanoj. Multaj koptoj, kiuj havis eblecon fari tion, forlasis Egiption kaj translokiĝis al okcidentaj landoj, inkluzive de Usono, Kanado, Aŭstralio. Tiu elmigrado bedaŭrinde kaŭzas gravan malfortiĝon de la kopta komunumo. Ĝi estigas la tiel nomatan “forfluo de cerboj”, nome, la kopta komunumo perdas siajn plej klerajn kaj kapablajn anojn. Kvankam la kvanto da personoj, kiuj restas estas sufiĉe granda, la intelektuloj, la fame konataj artistoj kaj la fakuloj pri diversaj fakoj foriras. Tial la kopta komunumo estas multe malpli riĉa ol ĝi estis antaŭe.

Stefano HAWKES-TEEPLES, sj

EN LA INTERRETO

“**Kristanaj Fontoj**”, la nova interreta portalo de Bernhard Eichkorn kaj Albrecht Kronenberger, prizorgata de Albert Josef Urban, estas oficiale malfermita ekde la unua dimanĉo de Advento. La retejo enhavas i. a. la Biblion, la tutan tekston de ADORU en formo de elŝutebla pdf-dosiero, multe da aktualigita materialo pri ADORU kaj ĉefe multajn piano-aranĝojn de Ernst Leuze. Ĝi servas ankaŭ kiel arkivo de revuo “Dia Regno” kaj donas spacon al sendataj manuskriptoj. Je ĉiu tago estas proponata spiritalaj impulsoj. La adreso de la portalo estas <http://fontoj.net/> (*informis: Albrecht Kronenberger*).

La paĝaro de la Franciskanoj en Sankta Lando (<http://www.custodia.org>) publikigis ankaŭ en 2010 la Kristnaskan Mesaĝon de la Gardanto de Sankta Lando, tradukitan de d-ro Antonio De Salvo. La tradukoj aperas jam de kelkaj jaroj, post peto de la IKUE-vicprezidantino Marija Belošević.

La oficiala kanalo de Vatikano en YouTube havas plian filmon kun subtekstado en E-o: temas pri la elsendo de la kristnaska Mesaĝo 2010 de la Papo. Por spekti la filmon: <http://www.youtube.com/watch?v=gG00xblHVCw&feature=channel>

La E-redakcio de Pola Radio dediĉis sian podkaston de la 27a de decembro 2010 ne nur al la kristnaska mesaĝo kaj E-lingva bondeziro de la Papo, sed ankaŭ al la 15a datreveno de la publikigo de la Meslibro en Esperanto, reelsendante intervjuon kun pastro Hatto von Hatzfeld: http://www2.polskieradio.pl/_files/20071205105911/2010122811162199.mp3. Bedaŭrinde la nova jaro alportis la finon de la pli ol 50-jara historio de tiu E-redakcio: la lasta elsendo estis publikigita en la oficiala retejo de la pola radio la 31-an de januaro 2011 kaj pliaj elsendoj ne okazos tra tiu portalo. Tamen, per volontulaj fortoj, eblis starigi (privatan) “Pola Retradio en Esperanto”-n. La unua sondatenaro datiĝas la 17an de februaro 2011 kaj oni povas aŭskulti la elsendojn je la adreso: <http://retradio.posterous.com>.

Katolika Sento en Ipernity. Ekde kelkaj monatoj la revuo de la itala sekcio de IKUE estas publikigita en Ipernity je ĉi tiu adreso: <http://www.ipernity.com/home/177224>. Ipernity estas servo kiu ebligas kundividi ĉiuspecajn plurmediajn dokumentojn. 40 tagojn post la unua publikigo oni atingis la nombron de 700 kontaktoj (*informis: Tiziana Fossati, el Katolika Sento*).

EVENTOJ

“**Bibliaj Tagoj 2011**” okazis de la 2-a ĝis 6-a de marto en Werl apud Dortmund (Germanio). Krom germanaj kristanaj esperantistoj ĉeestis ankaŭ alilandanoj (el Ĉeĥio, Francio, Italio, Nederlando kaj Slovakio). Oni legis bibliajn tekstojn kaj kantis kaj preĝis el ADORU tagmeze kaj vespere, ĉiam en Esperanto, escepte de la prediko dum evangelia Diservo, kiam predikis neesperantista germana pastro, kun samtempa traduko. Ĉiutage estis celebrita sankta Meso. Pri Biblio prelegis patro Willibald Kuhnigk OSB el Nüschau kaj Albrecht Kronenberger faris prelegon pri la nova interreta portalo “Kristanaj fontoj” (legu supre). Dum la tagoj oni ankaŭ vizitis plurajn muzeojn kaj preĝejojn en Werl kaj en la urbo Soest. Dum la adiaŭa vespero ĉiu nacia grupo prezentis popolkanton en la nacia lingvo. La kunvenon gvidis sinjoro Stefan Lepping el Werl, kiu ankaŭ surprenis la organizan laboron. (*el la Interreto*)

En la tagoj 27.-29.5.2011 okazos **IKUE-renkontiĝo en Slovakio** en urbo Nitra-Kalvario. Informojn oni povas ricevi el la LR de IKUE en Slovakio, s-ro Pavol Petrik (<pavol907@gmail.com> aŭ papere al lia adreso indikita en la lasta EK-paĝo).

De la 3a ĝis la 7a de junio 2011 okazos en Santa Giustina, Belluno, ĉe la Centro Papo Luciani **la 25a kongreso de la itala sekcio de IKUE**. La ĉefa kongresa temo estos: “Ni atendas novan ĉielon kaj novan teron”. La prelegoj havos kaj religian kaj kulturalan enhavon disvolvante la ĉeftemon laŭ du tavoloj: tio kion oni esperis, tio kio realiĝis, koncerne la vivon de la Eklezio, la historion de Italio en la 150a datreveno de ĝia unuiĝo, la vivon de la personuloj de la tero en kiu UECE kongresos. Pro tio la dumkongresaj ekskursoj celos: Pieve di Cadore (naskiĝloko de pentristo Tiziano), Canale d’Agordo (naskiĝloko de papo Johano Paulo la 1a), Vajont, Cortina. Ne mankos liturgiaj kaj preĝo-momentoj kaj kulturaj vesperoj. Pliaj informoj: katolika.sento@ueci.it - aŭ - http://www.ueci.it/kongresoj/kng_2011/ - aŭ oni skribu al la adreso de la LR de IKUE en Italio (vidu la lastan paĝon).

PERSONE

D-ro Antonio De Salvo, iama prezidanto de IKUE kaj ĝia nuna kasisto, estis promociita Sekcia Prezidanto de la itala Kortumo pri Kontoj (Supera Tribunalulo pri publikaj kontoj). La posteno estas tre

alta, sed ĝi kulturenas sekvon: li estis destinita prezidi la Sekcion de regiono Friulo-Julia Venetio (kun sidejoj en Triesto kaj Udine). Konkrete d-ro De Salvo ne sanĝos sian loĝlokon, sed devos periode iri al Triesto dum kelkaj tagoj, kun kompreneblaj efikoj sur lia profesia kaj familia vivo, ĉar Triesto distancas preskaŭ 700 kilometrojn el Romo. Gratulojn al d-ro De Salvo pro la prestiĝa posteno.

Fratino Maria Pia Mariani de Recanati (Italio) estas monaĥino “de beata Tereza de Kalkato”. Ŝi estis kunpremiita la 18an de novembro per “Premio Zamenhof, la voĉoj de la Paco, 2010”, aljugata ĉiujare de itala E-Federacio al italaj civitanoj kiuj distingigis pro la sindevigo al kunlaboro kaj reciproka komprenemo inter la popoloj. Kiam ŝi estis knabino, Germana Mariani laboris en firmao de Recanati (Italio) kaj kunlaboris en sia paroĥo. Ŝia vokiĝo – ŝi rakontas – naskiĝis en tiu medio: ŝi komprenis, ke tio, kion ŝi faris por Jesuo ne plu sufiĉis: “Li vokis min doni mian vivon en lia nomo”. Ŝi legis libron pri Patrino Tereza kaj pri la agado de la Misiistinoj de la Karitato kaj ŝi estis tiom ravita ke ŝi decidis vivi sian vivon laŭ la maniero de Patrino Tereza. Ŝi kontaktis la monaĥinojn kaj kun ili ŝi spertis konkrete novan vivostilon. Ŝi klare vidis, ke tiu estas la ĝusta vojo indikita de Jesuo kaj en 1978 ŝi eniras la ordenon kaj en 1986, je la ĉeesto de Patrino Tereza, ŝi monaĥiniĝas. La Meson celebris la tiama kardinalo Ratzinger. Fratino Maria Pia komencis sian agadon en Karlstadt (tiama GDR) kie ŝi restis dum tri jaroj. Komence de 1989 oni sendas ŝin al la domo en orienta Berlino kie ŝi travivas la falon de la Murego. El Berlino estas translokigita al Munkeno por esti superulino en la domo por gravedaj knabinoj. Ŝi daŭrigas sian mision en Nederlando, poste en Reggio Calabria (Italio) kaj sekve en Hindio. Ekde 2005 ŝi estas en Romo respondeculino pri la ordenaj domoj de centro-norda Italio. “En Jesuo – diras fratino Maria Pia, mi trovis la veran feliĉon, ĉar la Sinjoro donis al mi grandan familion kaj multajn gefilojn por prizorgi”. La tagon post la premiado, post renkonto kun grupo de studentoj en la urbodomo de ŝia naskiĝurbo Recanati fratino Maria Pia, salutante tre elkore la ĉeestantajn esperantistojn, kuraĝiĝis ĉiujn ilin antaŭenporti la esperantistajn valorojn kaj idealojn (*informis: Marco Menghini*).

Familio Masala (panjo Anne, paĉjo Bruno, gefiloj Elisabeth, Francjo kaj Gaetano) anoncas ke dimanĉon la 13an de marto, fine de la tago, en Épinal (Vosges, Francio) naskiĝis Héléne Marie Pauline Masala. Gratulon, gratulon, gratulegon, multe da diaj benoj kaj bonvenon, karega etulino, al la katolika komunumo flanke de la IKUE-estraro kaj de EK.

Jubileantaj IKUE-anoj. Nia prezidanto frato **Miloslav Šváček** 70-jariĝis la 2an de februaro. **D-ro Serio Boschin**, DM kaj iama estrarano de IKUE, fariĝis 80-jaraĝa la 3an de februaro kaj porokaze li deklaris, ke li volas daŭrigi sian esperantan agadon ĝismorte. EK kore gratulas kaj bondeziras .

FUNE BRE

La 25-an de decembro 2010 mortis longjara membro de slovakaj sekcio de IKUE kaj animzorganto de katolikaj Esperantistoj **P. Alojz Dlugi sj**. Li estis entombigita la 29-an de decembro. P. Dlugi estis unu el tiuj kuraĝaj homoj, kiuj dum la periodo de malpermeso de EK en la tiama Ĉeĥoslovakio, ricevis kaj distribuis la ekzemplerojn de la revuo senditajn de la Centra Oficejo de IKUE.

Per postlasaĵo al IKUE, oni eksciis ke forpasis la usona DM de IKUE **Austin Herschel**, de Tampa (Florido). Antaŭ multaj jardekoj (la rilato okazis kun pastro Beckers) S-ro Herschel donacis monsumon sufiĉe rimarkindan (por tiu tempo), kiu multe helpis la aperigon de EK en la fruaj sepdekaj jaroj, kiam redaktoro estis pastro Ruaro.

S-rino **Izabela Zalubska** de Krakovo (Pollando) forpasis la 14-an de februaro 2011 en hospitalo en Wadowice. Ŝi naskiĝis la 5-an de aŭgusto 1925. Dum multaj jaroj ŝi estis tre aktiva IKUE-anino de la krakova E-grupo.

Ni levu preĝojn al la Sinjoro por la animripozo de ĉi tiuj forpasintaj gefratoj.

RADIO VATIKANA - Elsendoj en Esperanto

La elsendoj okazas trifoje semajne, en la sama horo 21.20 MET (20.20 UTC)

DIMANĈE - daŭro 9'20" - frekvencoj: MO 585,1530 kHz - KO 4005, 5885, 7250, 7435 kHz. *Satellite:* Eutelsat 2 (13° E) transponder 54 (Bouquet Sky), vertikala polarizado, 11804 Mhz, aŭdkanalo E, 128 Kbit/s.

MERKREDE KAJ JAŬDE - daŭro 9' - frekvencoj: MO 1260, 1611 kHz - KO 6185, 7355 kHz. *Satellite:* Eutelsat 2 (13° E), vertikala polarizado, frekvenco 11804 MHz, dua aŭdkanalo (TelePace), FEC 2/3, S.R. 27.500. **Oni povas aŭskulti ankaŭ per la Interreto:**

http://www.oecumene.radiovaticana.org/esp/on_demand.asp

Granda arkivo: <http://www.radio-vatikana-esperanto.org>

Petu la senpagan sesmonatan program-bultenon.

Skribu al: **RADIO VATIKANA - ESPERANTO**

SCV-00120 CITTÀ DEL VATICANO

Ret-poŝto: <esperanto@vatiradio.va>

HEROLDO DE ESPERANTO, trisemajna informa gazeto pri la E-mondo, estas de 1920 je la servo de nia lingvo kaj ĝia parolkomunumo. 17 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, kongresaj numeroj ktp. Eldonas, posedas kaj administras: LF-koop. Mendu provkazempleron ĉe: Heroldo de Esperanto, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe informante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La baza jara kotizo de membroabonanto estas 25€, sed ĝi varias laŭ la lando: petu informojn rekte de la landaj reprezentantoj.

Se Via lando ne estas listigita ĉi tie, bonvolu kontakti rekte la Centran Oficejon de IKUE.

Membroj de IKUE rajtas aboni tra IKUE la KELI-revuon "Dia Regno" kontraŭ 10,00€. Membroj de KELI rajtas aboni EK kontraŭ 12,50€, pagendaj al la KELI-kasisto.

Argentino	Daniel A. Cotarelo García, Rivera Indarte 232 P.1 A, RA-1406 Buenos Aires
Aŭstrio	Hans M. Maitzen, Endemanngasse 6-18/1/24, A-1230 Wien <i>EK-peranto:</i> Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg
Belgio	Walter van den Kieboom, Wapenplein 17 - 8 , B-8400 Oostende
Brazilo	Lejsester J. Flores Mirò, Seminário Paulino 8556, Via Raposo Tavares km 18,5, Jd Arpoador, BR-05576-200 São Paulo SP <i>EK-peranto:</i> Brazila E-Ligo, C.P. 03625, BR-70084-970 Brasília DF
Burundio	Jean Thomas Mishosi Birindwa, B.P. 781, Bujumbura
Ĉeĥa Resp.	Miloslav Šváček, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice
Danlando	Eugeniusz Rybarczyk, Bispeparken 29.1th, DK-2400 Copenhagen NV
Estonio	Vjačeslav Hromov, p.k. 623, EE-12602 Tallinn
Francio	Anne-Marie Chaney, 56 rue Corvisart, F-75013 Paris
Germanio	Hans Moser, Gasteiner Str. 31, D-10717 Berlin
Hungario	P. Lajos Kóbor, H-9484 Pereszteg
Italio	Giovanni Daminelli, Via Lombardia, 37, I-20099 Sesto S.Giovanni
Japanio	Hatiroo Matubara, Namimatu-tyo 4/5, 596 Kisiwada-si, Oosaka-hu
Kongo	Jean Bosco Malanda Lutete, B.P 761, Kinshasa XI
Kroatio	Marija Belošević, Sveti duh 130, HR-10000 Zagreb
Kubo	Alberto José García Fumero, Calle 26 No 3313 E/33 y 35 Playa CP-11300 Ciudad Habana
Latvio	Jazeps Šlars, Zvaigžņu 20-26, 1009 Riga
Litovio	Adomas Mečislavas Grikpedis, A. Povilaičio 12-200, LT-2050 Vilnius
Nederlando	Simon Paul Smits, Deken Tomaslaan 32, NL-4453 AL 's-Heerenhoek
Nov-Zelando	Mike Leon, 171 Oxford Terrace, Lower Hutt
Pollando	Janina Trzpił, al. Wyszyńskiego 5F m 20, PL-21-560 Miedzyrzec Podlaski
Portugalia	Portugala E-Asocio, rua Dr J.Couto 6 r/c A, P-1500 Lisboa
Rumanio	Ioan Weiss, Str. Traian Nr. 28 Ap. 22, RO-430044 Baia Mare
Slovakio	Pavol Petřík, Na Dujave 3, SK-082 56 Pečovská Nová Ves
Tajlando	P. Marcel Perray, G.P.O. Box 1846, Bangkok 10501